

MARIA PATRINO DE LA EMANUELO

“Neniu iam vidis Dion”, asertas la kvara evangeliisto en la prologo al sia verko (vd. Joh.1,18), tio signifas ke ne estas eble al homa estulo posedi rektan konon de la diaĵo nek renkonti ĝin plene en la surtera vivo. En diversaj manieroj la homoj klopodis alfronti tian malhelpon, provante haltigi sian kondiĉon ĝis la plej alta nivelo, provante supreniri por renkonti la diecon; sed ĉiuj klopodoj supreniri aŭ sin altigi por povi renkonti Dion (kaj per la uzado de la popoloj, kaj per la amasigo de religiaj agoj) estis destinitaj al malsukceso.

Tiu ĉi limo estis superita ekde kiam, pere de Jesuo, Dio mem volis sin montri en la homa karno, malaltiĝinte kaj farinte sin mem homa estaĵo; kaj pro tio nur Jesuo, la ununura naskiĝinta Dio, konigis al ni la veran vizaĝon de Dio (“la solenaskita Filo, kiu estas Dio kaj kuŝas en la sino de la Patro, Lin deklaris”. Joh. 1, 18). El tiu ĉi aserto oni konkludas ke, antaŭ la alveno de Jesuo, ĉiuj klarigoj kiujn oni donis rilate Dion en la Sanktaj Skriboj estis partaj, ne kompletaj kaj eĉ malveraj. En la Evangelio laŭ Sankta Mateo oni trovas similan eldiron kiam Jesuo diros, dum diskuto kun la religia institucio kiu rifuzis lian agmanieron: “Neniu konas la Patron krom la Filo, kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin”. (Mt.11,27). La intenco de Jesuo konatigi la Patron koncernas tiujn kiuj akceptos Lian proponon pri pleno de vivo kaj aprobos Lian personecon; la ekkono de la Patro ne rilatas apartan grupon da homoj, nek grupojn kiuj fieras pri apartaj privilegioj, sed ĝi rilatas ĉiun homan estulon kiu rekonu en Jesuo la modelon de homeco. Se Dio fariĝis homo oni povas lin koni kaj renkonti nur estante personoj komplete homaj.

La altega kaj glora Dio, kies nomon la Judoj eĉ ne aŭdacis eldiri, estas montrata pere de Jesuo kiel Patro. Tiu ĉi nova bildo pri Dio havas iujn vivigajn efektojn por tiuj kiuj ĝin taksas kiel la veran kaj nuran kiu kapablu starigi raporton je plena komuneco kun la Sinjoro. Jesuo konigis al ni la Patron ne pere de abstraktaj konceptoj aŭ pere de komplikaj doktrinoj, sed pere de sia homeco (“Tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ la Patron”, Joh. 14,9), kaj ankaŭ la analogioj kiujn Li uzas por montri kiamaniere Dio rilatas al la homoj apartenas al la ĉiutaga medio kaj al io strikte homa. En la evangelioj estas prezentataj aspektoj de la Patro kiuj utilas lin konatigi kiel realecon proksiman al la homo. Jesuo priparolas Lin kiel ŝafiston (vd. Mt. 18,12; Lk. 15,5) kiel kamparanon (vd. Mk. 4,16; Joh. 15,1), temas pri metioj ligitaj al la tero kaj al la Palestinanoj plej humilaj kaj ne ĝuantaj bonan reputacion por la oficiala judismo, aparte en la kazo de la paŝtistoj. Sed Jesuo ne haltas nur al tiuj ĉi bildigoj, li preterpasas ilin kaj iras ĝis kompari la Patron eĉ al virino kiu disklopodas

ĉie ĉirkaŭe balaante la domon por trovi moneron kiun ŝi perdis (vd. Lk. 15,8). Se al la oreloj de la filistroj kunigi Dion al homa kategorio kiel tia de la virinoj, kiuj estis konsiderataj malsuperaj estuloj pro ilia ofta statuso de malpureco, povis ŝajni blasfemaĵo, estis absurdaĵo por la tiuepoka religia pensmaniero uzi la bildon de kokino por indiki la diaĵon; en la Malnova Testamento oni bildigis la protektadon de la Sinjoro al lia popolo kiel tiu de la aglo, la reĝino de la ĉielo, kiu vekas sian neston (vd. Readm. 32,11), kontraŭe Jesuo montris la protektadon kiun Dio volis oferi ekde ĉiam al la izraela popolo, kaj priparolis tiam la kovkokinon kaj siajn kokidojn (vd. Mt. 23,37; Lk.13,34), forigante tiamaniere de la bildo pri la Patro ĉiujn aspektojn kiuj povis timigi aŭ eĉ timegi.

La evangeliistoj pivotigas siajn rakontojn cirkaŭ la novaĵo alportita de Jesuo, nome la ebleco por ĉiu homo eniri en plenan agordon kun la transcenda Dio. Speciale, en la Evangelio laŭ Sankta Mateo tia novaĵo estas esprimita indikante Jesuon kiel la Emanuelon; la Evangeliisto re prilaboras la vortojn de la profeto Jesaja (Mt.1,23) kaj li mem donas la tradukon de la nomo: “Dio kun ni”. Tiu ĉi ĉeesto de la Dio, kiu en Jesuo fariĝis homo kaj kiu vivas meze de la aliaj homoj, trairas la tutan verkon de Sankta Mateo. Fakte Jesuo, substituiĝinte al la Leĝo, diros al Siaj disĉiploj: “Kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili” (Mt. 18,20). Kaj ĉe la fino de sia Evangelio la lastaj vortoj de la Kristo revokas la realon de la Emanuelo kiu sendas siajn disĉiplojn al ilia misio kaj sekurigas ilin pri lia porĉiama ĉeesto: “Jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo” (Mt. 28,20).

La dirmanieroj “Dio-kun-ni” kaj “Jen mi estas kun vi”, per kiuj Sankta Mateo malfermas kaj fermas sian rakonton, rompas iun ajn formon de religia ekskluzivismo ligita kun la ideo pri la Dio kiu diferencigas la homojn surbaze de ilia sinteno aŭ de ilia aparteno. Por la profeto Jesaja tiu “ni” kiu formas la nomon “Emanuelo” kompreneble rilatas la izraelan popolon sub la regado de Aĥaz, la reĝo de Jerusalemo, kies juna edzino naskos por li filon pludaŭrigante tiamaniere la davida gento (vd. Jes. 7, 14). Por la legantoj de Sankta Mateo, kontraŭe, tiu “ni” ne plu rilatas apartan popolon, sed ja tiujn kiuj akceptos la Dion kiu fariĝis homo, sendepende de ilia etna, religia aŭ seksa prapatro. Laŭ Sankta Mateo estas la paganoj kaj la flankenmetitoj de la religio tiuj kiuj akceptas la Emanuelon kaj ne la reĝo Herodo, la ĉefpastroj, la skribistoj aŭ la loĝantoj en Jerusalemo.

Kiam la paganoj, gvidate de la stelo, alvenas al la domo kie troviĝas la infano kun sia patrino, “ili ĝojis per granda ĝojo” (Mt. 2, 10), ankaŭ ili sin sentas partoprenantoj en la amo de Dio kiu ekskludas neniun de sia amo. Temas pri la sama sperto kiun havas la impostistoj kaj la pekuloj kiam ili sidiĝas ĉetabele kun Jesuo (Mt.9, 10). Tiu ĉi “ni” akiras amplekson neniam antaŭe pripensitan. Dio estas Patro por la bonuloj kaj por la malbonuloj ĉar Lia amo elverŝiĝas super ĉiuj, kiel faras la sunbrilo aŭ la fekundiganta pluvo (Mt. 5, 45), vitalaj ecoj kiuj certigas la vivon de la kreitaĵoj.

La nomo Emanuelo antaŭ ĉio indikas proksimecon, tion kio permesas la konon de la aliulo kaj ankaŭ la renkontiĝon kun li super iu ajn etna landlimo aŭ religia barilo. Temas pri proksimeco tiom granda ke ĝi kunfandiĝas en la homa karno.

La Dio kiu fariĝas homo en la sino de Maria ne plu povas esti disigita de la homaro nek oni povas lin renkonti se ne pere de la homeco. Tiel okazis al la tri reĝoj en la rakonto laŭ Sankta Mateo (Mt. 2, 10-11), aŭ al la paŝtistoj laŭ Sankta Luko (Lk. 2, 8- 16). Tiuj ĉi klasoj da homoj ambaŭ estas flankenpuŝitaj de la religio kaj de la socia medio, sed ili estas akceptataj de la Dio kiu sin oferas al ili, kaj ili renkontas “la reĝon de la Judoj” (vd. Mt. 2, 2- 11), aŭ “la Savanton” (vd. Lk. 2, 11, 16), ne en la lukso de reĝa palaco kaj eĉ ne en la sankteco de sanktejo, sed en la plej homa medio kiun la homo konas, tiu de domo kaj en sinteno kiu estas komuna al ĉiu ĵus naskita kreitaĵo; li estas prizorgata de sia patrino, kiu lin vindas kaj lin kuŝigas en varma loko. La reĝoj kaj la paŝtistoj ne trovis korteganojn je la servo de la reĝo, nek reĝajn insignojn kiuj gloris lian povon, nenium vicon da sacerdotoj glorantaj la majestecon de tiu kiu estis sendita de la plej alta Dio kiel sian beniton. La enkarniĝo montras ke nur tio kio estas homa taŭgas al Dio, nur tio kio alproksimiĝas unu al la aliaj nuliginte la hierarkion, la barojn kaj la antaŭjuĝojn, tio antaŭenpuŝas la kreskadon kaj la dignon de ĉiu homo kaj estas la manifestiĝo de la “Dio-kun-ni” (vd. Mt. 8, 1-17).

Ĉio tio klarigas la ŝanĝon alportitan de Jesuo rilate la religian tradicion kaj koncerne la rilaton kiun oni devas havi kun Dio. Ĉar Jesuo instruas al siaj disĉiploj nomi Dion “Patro”, la rilato kun li akiras tute novan dimension. Anstataŭ la submetiĝo kaj la obeo al la Plejaltulo, al la Dio de la leĝo, kiel instruis la religio, Jesuo proponas la agordon kun la Patro kaj la similon kun Li; kaj ne plu estos eterna leĝo kiu gvidos la vivon de la homoj, sed ja la amo kiun la Patro inspiras al siaj filoj. Se la Libro Levitoj sin turnis al la sankteco de Dio por revenigi la sanktecon de la izraelanoj (“estu do sanktaj, ĉar Mi estas sankta”, Lev. 11, 45), sanktecon kiu laŭ la doktrino de la skribistoj efektiviĝis pere de la disigo disde tiuj kiuj ne observis la Leĝon, Jesuo, kontraŭe invitas siajn disĉiplojn esti indulgemaj kaj kompatemaj kiel la ĉiela Patro (vd. Mt. 5, 45); se la sankteco, komprenata kiel akumuligo de religiaj ritaĵoj, ne estas je la eblo de ĉiuj homoj kaj kreas diskriminaciojn inter la homoj kaj eĉ disiĝon inter ili, kontraŭe la kompato alproksimiĝas unu al la aliaj la homoj, ĝi preterpasas ĉiuspeĉan antaŭjuĝon kaj igas la homojn pli homaj ĝis ilin similigi al Dio mem.

La novaĵo alportita de Jesuo ne nur ne estos komprenata de ĉiuj, sed ĝi estos forĵetita kiel skandalo kaj blasfemo de tiuj kiuj metis sian sekurecon en religian sistemon kiu instigis rilatojn de regado kaj de subigo. “Li venis al siaj propraĵoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis.” (Joh. 1, 11). La vortoj de la prologo de Sankta Johano antaŭanoncas tiun kiu estos la sorto de la Dio fariĝinta homo. Forigi la barojn kiuj disigis la popolojn kaj la homojn estos konsiderata kiel atenco al integreco de la tiutempa religia institucio, kies prerogativo por eniri la promesojn kaj la diajn benojn baziĝis sur la observado de normoj kaj reguloj.

La unuaj homoj kiuj akceptis la Dion-kun-ni estos ankaŭ la atestantoj de tiu rifuzo fare de la socio kaj de la religia medio. Sankta Jozefo kaj la Virgulino Maria fakte spertis mem la malhomecon de la povo kiu ne toleras iun ajn specon de malkonsento aŭ de kontraŭstaro, kaj ilia forfuĝo al Egiptujo kun la infano (vd. Mt. 2, 13-18) estas la bildigo pri nova eliro, tiu al la plena libero, kiun Jesuo efektivigos per sia morto kaj resurekto. La Virgulino Maria estos la homa kreitaĵo kiu elmontros la

veran akcepton de la Dio-kun-ni per sia vivo kaj sia inklino mem, sukcesinte tiamaniere sin transformi de patrino de Jesuo al perfekta virina disĉiplo de la Kristo. Ŝia proksimeco al Dio fariĝinta homo estos la konstanta elemento kiu distingos ŝian tutan vivon kaj orientos ĉiujn ŝiajn elektojn. Por la Virgulino Maria la pinta momento de tiu proksimeco okazos en kunteksto de malamo kaj perforto incititaj de la reprezentantoj mem de la religia institucio, ekster ĉiu sankteco, kiel estis la loko por la ekzekuto de la plej fiaj krimuloj kaj kie estis malobeataj ĉiuj normoj pri pureco (sangelverŝo, ĉeesto de paganoj kaj de la pekuloj). Proksime de la eŝafodo kie estis la komdamnito, la Virgulino Maria atestas sian plenan proksimecon al la Dio-kun-ni.

La dieco kiu troviĝas en ni (Emanuelo) ne sin montras per la forfuĝo el la realo, nek per la faro de elektoj kiuj ne kongruas kun la ĉiutaga vivo, nek per la aliĝo al la potenculoj, sed ĝi sin montras per la antaŭenpuŝo de ĉiu natura flanko de la homeco. La ununuran vojon por renkonti Dio oni trairas malfermiĝante al la homeco de Kristo, la ununura kiu konigas al ni la Patron.

Ricardo Pérez Màrquez
Centro pri Bibliaj Studoj
“G. Vannucci”
Montefano (Mc)

